# Zum Begriff der Gerechtigkeit

Helmut Angstl


## Zusammenfassung

Gegenstand der Gerechtigkeit sind Verteilungen von Gütern oder Übeln auf Menschen. Solche Verteilungen werden als mehr oder weniger gerecht beurteilt, letztlich nach dem Gerechtigkeitsempfinden. Verteilungen werden von Personen oder gesellschaftlichen Einrichtungen, die Macht dazu haben, realisiert. Dabei bedient man sich meist der Gesetzgebung. Die Verantwortung für Gerechtigkeit liegt dann bei diesen Instanzen und, in anderer Weise, auch bei deren Mitarbeitern. Gleichheit hat viel mit Gerechtigkeit zu tun, ist aber etwas anderes.


## 1. Gegenstand der Gerechtigkeit

Wenn von Gerechtigkeit die Rede ist, handelt es sich immer um emotional Wichtiges, um Gutes oder Schlechtes, um Besitz von Geld und Gut, aber auch von dessen Verlust, um Lob und Anerkennung oder das Gegenteil davon, um Freiheit und Handlungsmöglichkeit oder dessen Mangel, um Glück und Wohlbefinden oder Leiden. Dabei sind diese Güter bzw. Übel nicht als Dinge gedacht, die man in seiner Macht hat. Sie kommen von aussen. Daher möchte ich für solch ein Gut oder Übel den gemeinsamen Namen Widerfahrnis verwenden.

Widerfahrnisse werden einem zugeteilt. Unter Zuteilung verstehe ich daher eine Relation zwischen Person und Widerfahrnis: Z(x,W) [(1)]. Beispiele: x hat eine krumme Nase, x hat Kopfweh, x hat ein Jahreseinkommen von € 7000, x sitzt im Gefängnis, x bekommt keine Rente, x erhält eine Auszeichnung, x wird verletzt, x wird Minister. (Dabei kann es sich um vorübergehende oder dauerhafte Zuteilungen handeln.) Nicht als Zuteilung gelten lassen würde ich z.B. "x geht spazieren", weil selbstgewählt.

Im Hinblick auf Gerechtigkeit sind nicht nur einzelne Zuteilungen interessant. Man betrachtet gewöhnlich mehrere Personen und ihre Widerfahrnisse, um vergleichen zu können. Eine endliche (nicht leere) Menge von Zuteilungen möge Verteilung (V) heißen:

$$V = \{Z(x_1, W_1), Z(x_2, W_2), \ldots Z(x_n, W_n)\}$$

Verteilungen, wirkliche wie gedachte, sind der Gegenstand der Gerechtigkeit [(2)].

Es gehört zum Wesen der Verteilungen, daß sie größtenteils nicht von Dauer sind. Sie können sich ändern und geändert werden.



# Pri la nocio de justeco

*Helmut ANGSTL*


## Resumo

Objekto de justeco estas distribuoj de bonoj kaj malbonoj al homoj. Tiaj distribuoj estas prijuĝataj pli aŭ malpli justaj, fine laŭ la sento pri justeco. Distribuoj estas realigataj de personoj aŭ institucioj, kiuj havas sufiĉan potencon. Pro tio oni uzas plej ofte leĝodekretadon. La responson pri justeco havas ĉi tiuj instancoj kaj, en alia maniero, ankaŭ ties kunlaborantoj. Egaleco estas forte ligita kun justeco, sed estas io alia.


## 1. La objekto de justeco

Se oni parolas pri justeco, ĉiam temas pri io emocie grava, pri bono kaj malbono, pri posedo de mono aŭ grundo, sed ankaŭ pri ties perdo, pri laŭdo kaj agnosko aŭ ties kontraŭo, pri libereco kaj agadeblo aŭ ties foresto, pri bonŝanco kaj bonfaro aŭ suferoj. Tiuj ĉi bonoj resp. malbonoj ne estas pensitaj kiel aĵoj, pri kiuj oni havas potencon. Ili venas de ekstere. Pro tio mi volas doni al tiuj ĉi bonoj kaj malbonoj la komunan nomon spertaĵoj.

Spertaĵoj estas atribuataj. Kiel atribuon mi komprenas rilaton inter persono kaj spertaĵo: A (x , S).[(3)] Ekzemploj: x havas fleksitan nazon, x havas kapdoloron, x enspezas po € 70 000 jare, x sidas en malliberejo, x ne ricevas renton, x fariĝas ministro. La atribuaĵoj povas esti momentaj aŭ pli longe daŭraj. "x promenas" mi ne taksas atribuo, ĉar temas pri mem-elektita ago.

Koncerne justecon ne nur unuopaj atribuoj estas interesaj. Kutime oni rigardas plurajn personojn kaj iliajn atribuaĵojn por povi kompari. Fina (ne malplena) aro de atribuoj nomiĝu distribuo (D).

$$D = \{A(x_1, S_1), A(x_2, S_2), \ldots A(x_n, S_n)\}$$

Distribuoj, realaj aŭ pensitaj, estas la objekto de la justeco [(4)].

Esenca eco de distribuoj estas, ke ili plejparte ne havas longan daŭron. Ili ŝanĝiĝas kaj estas ŝanĝataj.

**2. Wertung**

Verteilungen werden hinsichtlich ihrer Gerechtigkeit beurteilt. Sie werden als gerecht oder ungerecht eingestuft, aber auch komparativ als mehr oder weniger gerecht. Sie bekommen einen Gerechtigkeitswert. Da die Verteilungen geändert werden können, wird man wünschen und dafür sorgen wollen, dass sie mit der Zeit gerechter werden. Es scheint einen höchsten, idealen Gerechtigkeitswert zu geben, ausgedrückt durch das schon in der Antike geprägte "Suum cuique! " – "Jedem das Seine!". Das wäre so etwas wie objektive Gerechtigkeit, die vielen als ideales Ziel erscheint. Ich glaube aber, dass wir höchstens eine gewisse Zufriedenheit erreichen können, wobei wir das "Seine" als etwas interpretieren, das dem Gewünschten möglichst nahe kommt. Wir können, in Analogie zur Formel von Bentham [5] nach der größtmöglichen Zufriedenheit möglichst vieler Menschen streben.

Wer ist es nun, der Gerechtigkeitsurteile fällt? Es sind die von Verteilungen Betroffenen, aber nicht nur sie. Fast jeder Mensch fühlt sich kompetent, gemäß seinem Gerechtigkeitsempfinden Urteile abzugeben. Das Gerechtigkeitsempfinden kann egoistisch von Neid geprägt sein oder aber auch aus der Fähigkeit, sich in Andere "hineinzudenken", resultieren. Es ist ein Teil der persönlichen Moral.

**3. Das Woher der Verteilungen**

Jeder kann sich beliebige Verteilungen ausdenken und sie herbeiwünschen. Über Verteilungen diskutiert man überall, wo Menschen zusammenkommen, in öffentlichen Gremien und in den Medien. Realisiert aber werden sie von den "Mächtigen". Es kann Gott gemeint sein, der als Schöpfer und Lenker der Welt angeborene Eigenschaften und Schicksale verteilt, auf die der Mensch keinen oder nur geringen Einfluss hat. Das können einzelne Personen, Monarchen, Diktatoren oder Mafiabosse sein. Aber heute sind es vor allem verfassungsmäßige Institutionen, die verantwortlich für Verteilungen im öffentlichen Leben sind. Auf sie und die einschlägig tätigen Personen werden dabei jene Gerechtigkeitsurteile übertragen, die die betreffenden Verteilungen erhalten.

**4. Gerechtigkeit nach Regel und Gesetz**

Verteilende Institutionen wären überfordert, wenn sie für jeden einzelnen Bürger die Zuteilungen bestimmen wollten. Sie bedienen sich der Gesetzgebung und erlassen Verteilungsnormen. Ihr Inhalt hat die Form:

Für alle Menschen x (eines bestimmten Bereichs):
Wenn x die Bedingungen B erfüllt, dann wird x das Widerfahrnis W zugeteilt.



**2. Valorigo**

Distribuoj estas prijuĝataj laŭ justeca kvalito. Ili estas envicigitaj kiel justaj aŭ maljustaj, sed ankaŭ kompare kiel pli aŭ malpli justaj. Ili ricevas justecvaloron. Ĉar la distribuoj povas esti ŝanĝataj, oni deziros kaj zorgos, ke ili kun paso de tempo fariĝas pli bonaj. Ŝajnas ekzisti plej alta, ideala justecvaloro, esprimita per "*Suum cuique!*", "Al ĉiu la sian!", formulita jam en la tempo antikva. Tio estus la objektiva justeco, kiu por multaj ŝajnas esti ideala celo. Sed mi kredas, ke ni maksimume povas atingi certan kontentecon. Interpretante la "sian" kiel ion, kio estas eble plej proksima al la dezirato, ni povas strebi, analoge al la formulo de *Bentham*[6], al la plejeble granda kontenteco de plejeble multaj homoj.

Kiuj estas tiuj, kiuj verdiktas juĝon pri justeco? Estas tiuj, kiuj estas koncernatoj de la distribuoj. Sed ne nur ili. Preskaŭ ĉiu sentas sin kompetenta, juĝi laŭ sia sento pri justeco. La sento pri justeco povas esti influita de egoismo kaj envio, sed povas ankaŭ rezulti el la kapablo "image sin transloki" en aliajn. Temas pri parto de la persona moralo.

**3. De kie venas la distribuoj?**

Ĉiu povas revi pri eblaj distribuoj kaj deziri ilin. Pri distribuoj oni diskutas ĉie, kie kunvenas homoj, en oficialaj rondoj kaj en la gazetaro. Sed fine la "potenculoj" estas tiuj, kiuj realigas ilin. Oni povas pensi pri Dio, kiu distribuas kiel kreinto kaj gvidanto de la mondo denaskajn ecojn kaj sortojn, kiujn homoj ne aŭ nur malmulte povas influi. Povas esti unuopaj homoj, monarĥoj, diktatoroj aŭ mafiestroj, kiuj ordonas distribuojn. Sed hodiaŭ estas precipe konstituciaj institucioj, kiuj responsas pri distribuoj en la publika vivo. Al ili kaj al la respektivaj agantaj personoj estas transmetataj la justec-juĝoj, kiujn ricevas la ordonitaj distribuoj.

**4. Justeco laŭ reguloj kaj leĝoj**

Distribuantaj institucioj estus tro okupataj, se ili devus difini la atribuon por ĉiu unuopa civitano. Ili uzas la eblon dekreti leĝojn kaj eldonas distribunormojn. La enhavo de tiaj normoj havas la formon:

Por ĉiuj homoj x (el difinita kolektivo):
se x plenumas la kondiĉon K, x ricevas la spertaĵon S.

Die Verteilungen ergeben sich aus der Befolgung der Norm. Als Grenzfall sind auch bedingungslose Verteilungsnormen möglich.

Beispiele: (Ich beschreibe nur den Inhalt der Norm, ohne Imperativ)

(1) Wer über 7000 Euro Jahreseinkommen hat, zahlt davon 30% Steuer.
(2) Wer mehr als 1 Million Euro im Jahr einnimmt, zahlt keine Einkommenssteuer.
(3) Wenn ein Arbeiter krank wird, enfällt der Lohn.
(4) Nur Adelige können Minister werden.
(5) Mörder erhalten lebenslangen Freiheitsentzug.
(6) Wer dem Volk X angehört, wird getötet.
(7) Wer zuerst kommt, wird zuerst bedient.
(8) Unter gleicher Wartefähigkeit wird zuerst bedient, wer zuerst kommt.
(9) Die Würde des Menschen wird nicht angetastet.
(10) Niemand stirbt an Hunger.

Es ist klar, dass es jetzt die Verteilungsnormen (und damit auch die normsetzenden Instanzen) sind, die man hinsichtlich Gerechtigkeit beurteilt:

(2) und (6) wird niemand für gerecht halten. Zu (3) gibt es verschiedene Meinungen. (4) akzeptiert heute niemand mehr. (5) wird nicht für gerecht halten, wer in diesem Fall für die Todesstrafe ist. (8) ist wohl gerechter als (7). Auch bei (1) wird man eine differenziertere Regelung für gerechter halten. Hier haben wir Beispiele für den komparativen Gebrauch von "gerecht". (9) und (10) sind Beispiele für bedingungslose Norminhalte.

Verteilungsnormen ergeben sich im Wesentlichen aus dem Bestreben, das "Jedem das Seine!" nach Möglichkeit zu konkretisieren.

Der Inhalt der Verteilungsnormen wird leider auch durch 'Sachzwänge' beeinflusst: "Wo nichts ist, hat der Kaiser das Recht verloren."

## 5. Die Pflicht der Exekutive

Aus der Struktur der Verteilungsnormen ergibt sich ein zweiter Gerechtigkeitsbegriff, der Pflicht der Exekutive heißen könnte. Diese Pflicht haben Menschen, die mit der Durchführung von Zuteilungsnormen zu tun haben. So jemand handelt ungerecht, wenn er eine Zuteilungsnorm verletzt oder ihre Verletzung zulässt. Ein Richter z.B., der nicht nach dem Gesetz sondern nach Sympathie oder Laune urteilt, handelt ungerecht. Ob das Gesetz selber gerecht ist, ist eine andere Frage. Aber im Rahmen einer Norm muss jeder gleich behandelt werden:



La distribuoj fariĝas el la obeado al la normoj. Kiel limkazoj eblas ankaŭ distribunormoj sen kondiĉo.

Ekzemploj: (Mi priskribas nur la enhavon de la normoj, sen imperativo)

(1) Kiu enspezas jare po pli ol 7000 eŭrojn, pagas 3% imposton.
(2) Kiu enspezas jare po pli ol 1 milionon da eŭroj, ne pagas enspezimposton.
(3) Se laboristo malsaniĝas, li ne plu ricevas salajron.
(4) Nur nobeloj povas fariĝi ministroj.
(5) Murdintoj restas dumvive en la malliberejo.
(6) Kiu apartenas al la popolo X, estas mortigata.
(7) Kiu venas unue, estas servata unue.
(8) Inter personoj kiuj same kapablas atendi, estas servata unue tiu, kiu venas unue.
(9) La digno de homo ne estas lezata.
(10) Neniu mortas pro malsato.

Evidentas, ke nun estas la distribunormoj (kaj pro tio ankaŭ la normon donantaj instancoj), kiujn oni prijuĝas rilate justecon:

(2) kaj (6) neniu taksos justaj. Pri (3) ekzistas diversaj opinioj. (4) hodiaŭ neniu plu akceptas. (5) ne taksos justa, kiu pledas ĉi-kaze por mortpuno. (8) kredeble estas pli justa ol (7). Ankaŭ de (1) oni pli detalan regulon taksos pli justa. Ĉi tie ni havas ekzemplojn por la kompara uzo de "justa". (9) kaj (10) estas ekzemploj de senkondiĉaj normenhavoj.

Distribunormoj ekestas esence de la celo, konkretigi la "Al ĉiu la sian!"

Bedaŭrinde ankaŭ la 'perfortoj per la realo' influas la enhavon de distribunormoj: "Kie estas nenio, eĉ imperiestro ne havas rajton".

## 5. La devo de la realigantoj

El la strukturo de la distribunormoj ekestas dua nocio de justeco, kiu povus nomiĝi "devo de la realigantoj". Tiun ĉi devon havas homoj, kiuj agas rilate la realigon de distribunormoj. Tia persono fariĝas maljusta, se li lezas distribunormon aŭ toleras lezadon. Ekz. juĝisto, kiu juĝas ne laŭ la leĝo, sed laŭ simpatio aŭ laŭ iu kaprico, agas maljuste. Ĉu la leĝo mem estas justa, estas alia demando, sed en la kadro

"Omnibus idem! " – "Jedem das Gleiche!" ist eine andere alte Form der Gerechtigkeit.

### 6. Gerechtigkeit und Gleichheit

Ohne Zweifel spielt Gleichheit beim Entstehen des Gerechtigkeitsempfindens eine große Rolle. Wenn von Gerechtigkeit die Rede ist, denken fast alle zuerst an Gleichbehandlung, Chancengleichheit und Ausgleich von Unrecht – und nicht gleich an Anerkennung von Leistung. Aber Gleichbehandlung scheint mir eher die Tugend der Exekutive zu sein als die des Gesetzgebers [7] .

Von der Formel "Jedem das Gleiche!" gibt es freilich noch eine andere, ganz wörtlich genommene Auffassung. Nach dieser Auffassung handelt es sich um ein Prinzip, das das "Jedem das Seine!" ersetzen soll. Dabei wird etwa so argumentiert: Reichtum und sozialer Status sind weitgehend vom Zufall abhängig und nicht vom Verdienst. Aber nicht nur das. Der Mensch kann gar nichts für seine Talente und Fähigkeiten, die sich aus Vererbung und Erziehung ergeben; er ist nicht verantwortlich für seine Neigungen und Triebe, letztlich auch nicht für seine Taten. Gerechtigkeit kann daher nur bedeuten, dass jeder den gleichen Anteil an Glück und Wohlergehen hat. Aber dieses Ideal der Gleicheit ist – jedenfalls in dieser Welt – noch weniger realisierbar als das "Jedem das Seine!"

Die beiden Gerechtigkeitsprinzipien scheinen in Konkurrenz zueinander zu stehen. Sie sind aber logisch gleichrangig. "Jedem das Gleiche!" kann als Spezialfall oder als Konkretisierung von "Jedem das Seine!" aufgefasst werden, aber nicht umgekehrt.

### Notoj

(1) *zu lesen: „Der Person x wird das Widerfahrnis W zugeteilt“.*

(2) *Im Anschluss an Aristoteles hat man zwischen zuteilender und ausgleichender Gerechtigkeit unterschieden. Diese lässt sich aber auf jene zurückführen. Ausgleichende Gerechtigkeit geschieht einfach durch eine andere (bessere) Verteilung.*

(3) legende: “Al la persono x estas atribuata la spertaĵo S”.

(4) Sekvante Aristotelon oni distingis inter atribua kaj kompensa justeco. Sed la lasta estas reduktebla al la unua. Kompensa justeco simple fariĝas per alia (pli bona) distribuo.

(5) *Jeremy Bentham* (1748-1832), *englischer Moralphilosoph, populär geworden durch die Forderung: “Das größtmögliche Glück für die größtmögliche Zahl (der Menschen)!”*

(6) *Jeremy Bentham* (1748-1832), angla moralfilozofo, famiĝis per la postulo: “La plejeble grandan bonfarton al plejeble granda nombro (da homoj)!”

(7) *Während der Revolution in Russland hat es den Versuch gegeben, "gleichen Lohn für alle" zu realisieren. Er wurde aufgegeben.*

(8) Dum la revolucio en Rusio oni provis realigi "saman salajron por ĉiuj". Oni rezignis pri tio.



de normo ĉiu devas esti traktata egale. "*Omnibus idem!*" – "Al ĉiu la samon!" estas alia malnova formulo pri justeco.

### 6. Justeco kaj egaleco

Sendube egaleco ludas grandan rolon ĉe la ekesto de la sento pri justeco. Se oni parolas pri justeco, preskaŭ ĉiuj pensas unue pri egaltraktado, egaleco de ŝanĉoj kaj kompenso de maljustaĵoj – kaj ne tuj pri merito-agnosko. Sed egaltraktado laŭ mi plie estas virto de la realigantoj ol virto de la leĝkreantoj [8].

Cetere pri la principo "Al ĉiu la samon!" ekzistas ja ankaŭ alia, tute laŭvorta koncepto. Laŭ tio, la koncepto "Al ĉiu la samon!" temas pri principo, anstataŭanta "Al ĉiu la sian!" La argumentado estas eble tia: Riĉeco kaj socia stato dependas vaste de la hazardo kaj ne de merito. Sed ne nur tio. La homo ne povas influi siajn talentojn kaj kapablojn, kiuj rezultas el heredo kaj edukado; li ne respondecas pri siaj inklinoj kaj impulsoj kaj fine ankaŭ ne pri siaj agoj. Pro tio justeco povas signifi nur, ke ĉiu havu la saman porcion de feliĉo kaj bonfarto. Sed ĉi tiu idealo de justeco estas en nia mondo eĉ malpli realigebla ol la "Al ĉiu la sian!"

Ambaŭ principoj de justeco ŝajnas konkurenci inter si. Sed ili ne havas la saman logikan rangon. "Al ĉiu la samon!" povas esti konsiderata kiel speciala kazo aŭ konkretiĝo de "Al ĉiu la sian!", sed ne inverse.

### Adreso de la aŭtoro

*OProf. Dr. Helmut* ANGSTL
*Brucknerstr. 11*
*DE – 92224 A m b e r g*
GERMANIO

<helmut.angstl@t-online.de>

### Priaŭtora informo

La aŭtoro studis en Munkeno (*Ludwig-Maximilian*-Universitato) matematikon, fizikon kaj filozofion. Nun li estas orda profesoro ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino kaj dekano de la filozofia sekcio.